

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond, prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, pri la vivo en Esperantujo.

Jam de kelkaj jaroj ni parolas en Esperantujo pri la iniciativoj de la verdstela observatorio en Zagrebo. Sub la gvidado de la astronomo d-ro Gabrijel Divjanoviĉ fondiĝis grupo de junaj astronomoj-esperantistoj. Tiu grupo verkis antaŭ du jaroj broŝuron titolita *Totala suneklipso*. En tiu libreto ili ne nur klarigis al ni la fenomenon, kiun ni povis observi en Eŭropo la 15-an de februaro 1961, sed ili anoncis la organizon, ĉe la bordo de Adriatiko, de kampadejo nomata « Esperantujo ».

La saman jaron tiu grupo de junaj astronomoj eldonis verkon, pri kiu oni jam multe parolis kaj pri kiu oni ankoraŭ povos multon diri. Titolita *Tragedio en la universo*, tiu libro popularscience priskribas la danĝeron de atoma milito por la estonto de la homaro. Ivo Rotkviĉ, kiu esperantigis tiun verkon el la kroata, uzis rimarkinde riĉan lingvon, kiu stile estas studenda de ĉiuj, kiujn la evoluo de nia lingvo interesas.

Koncerne la restadejon « Esperantujo », kiu situas en Primoŝteno, urbeto inter Ŝiberniko kaj Splito, aperis du broŝuroj : unue *Esperantujo* kaj poste *Kampadejo de pacamikoj sur la bordo de Adriatiko*.

Ni menciuj, ke lastjare pli ol okcent esperantistoj restadis en tiu ekfama somerumejo « Esperantujo ». Inter ili troviĝis anoj el ĉiuj eŭropaj landoj. Mia celo hodiaŭ ne estas rakonti pri tiu kampadejo, ĉar vi certe jam multon aŭdis pri ĝi. Mi hodiaŭ volas anonci al vi novan iniciativon de tiu vigla grupo de junaj astronomoj el Zagrebo. Per sia agado ili sentis la mankon de popularscienca organo tutmonda, kaj tiam kuraĝe ili fondis novan revuon, *Homo kaj kosmo*, kies nunan numeron ili dissendis tra la tuta mondo pere de la delegitaro de la ĉefaj esperantistaj organizaĵoj. Mi hodiaŭ volas saluti tiun revuon, kiu certe plenigas mankon en nia gazetaro, mankon bone sentatan de la granda publiko kaj de la edukistaro.

*Homo kaj Kosmo*, kiu sin anoncas kiel kvaronjara periodaĵo, montras sin ĉiurilate bonega : prese kaj papere ĝi estas alloga, tekste kaj stile ĝi estas altnivela, teme ĝi estas tre interesa, ideo ĝi estas kuraĝa kaj klavida. Jen do certe kvalitoj, kiuj permesos al tiu revuo varbi sufiĉe da abonantoj por finance sukcesi trapasi kiel eble plej rapide la periodon de la dependo de mecenato. Ni menciuj, ke la mecenato por tiu revuo estas la Observatorio en Zagrebo.

Permesu, ke mi legu kelkajn frazojn el la enkondukaj vortoj al la unua numero de *Homo kaj Kosmo* :

« Ni vivas en la epoko de la artefaritaj satelitoj kaj kosmaj vojaĝoj, en la epoko de la surprizaj, preskaŭ fantaziaj atingoj de la scienco kaj tekniko. [...] Por kontentigi la vastan intereson de la publiko en la tuta mondo, verdire, svarmas popularsciencaj revuoj pritraktantaj la problemojn de kosmovojaĝoj, de la tekniko kaj de la natursciencoj ĝenerale. La popularaj revuoj pri naturscienco estas eldonataj en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj lingvoj. Nur ne en esperanto ! (Fino de la citaĵo.)

Do kiel vi konstatas, tiu revueto venas plenigi mankon. Tio jam estas mencienda kaj subtenenda. Se nia movado progresis kaj konkeris la tutan mondon, tio estas dank'al la sindono de tiuj samideanoj, kiuj, kiam ili konstatis mankon, kuraĝis ĝin malaperigi pere de sia laboro. Novan brikon alportas niaj kroataj samideanoj por la konstruo de nia granda, mi eĉ diros, grandioza afero. Ni festu tiun fakton ne nur per vortoj, sed konsciante, ke ni ĉiuj povas helpi cementi tiun brikon. (Jen nova citaĵo :) « Por nun la revuo prosperas dank'al la konsiderinda financa elspezo de la Astronomia Observatorio en Zagrebo. Certe, la Observatorio faris sian devon rilate al propagando de esperanto : la Observatorio faris la unuan paŝon – ĝi eldonis aktualan, popularsciencajn esperanto-revuon. Nun la fervoraj

esperantistoj faru la duan paŝon : helpu la revuon per la disvastigo kaj aboniĝo ! » (Fino de la citaĵo.)

Tiu revuo povos ludi grandan rolon en Esperantujo. Dank'al sia popularscienca karaktero ĝi povos klarigi al la esperantistaro plej diversajn sciindaĵojn. Ĝi do preskaŭ povas esti konsiderata kiel kulturigilo, kaj tio (ni citas) « *ĉiam restante fidela al la sciencistaj idealoj de la vero kaj homaruniĝo, kies finan venkon tiel konvinke profetis la kreinto de esperanto, d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.* » (Tiun frazon ni trovas ĉe la fino de la enkondukaj vortoj.)

Dum tiom da popularsciencaj periodaĵoj servas ne nur la sciencon, sed tre ofte ankaŭ naciistajn tendencojn, kaj tiel malfruigas la unuiĝon de la homaro, ekde hodiaŭ ni povas fieri, ke en Esperantujo ekzistas revuo, kiu disvastigas ĉe la granda publiko sciencajn konojn sen samtempe provi kredigi je la supereco de naciaro (tendenco ege vigla ĉu okcidente, ĉu oriente) sed kiu komprenigos al la esperantistaro, ke la scienco apartenas al la tuta mondo, kaj ke la sciencaj malkovroj estas la frukto de la laboro de serĉantoj apartenantaj al la tuta homaro.

Jen grava porpaca tasko subtenenda de ĉiuj samideanoj.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond pri la vivo en Esperantujo.

Ni rememorigas al vi, ke Radio-Svislando havas po kvar esperantajn elsendojn semajne: lunde kaj merkrede je la 13a horo 20 kaj ripete ĵaude kaj sabate je la 22-a horo 15. Serĉu niajn elsendojn sur la bendoj 31 kaj 48 metroj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-